# Produktiva posttagmezo en Sofio

La stato de la movado kaj la landa asocio de UEA kaj ĝiaj perspektivoj por progreso formis la ĉeftemon por kvar-hora kunveno kun dek kvin aktivuloj de Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) kaj la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill.

La partoprenintoj, venintoj el sepo da urboj, traktis plenŝtopitan dek-punktan tagordon, unu el kies celoj estas, ke UEA pli bone komprenu la enlandan realecon. Tiucele la partoprenintoj plenumis FLAM-analizon pri la landa movado. Tio estas:

**Fortoj:** kio fortas kaj bone funkcias en BEA?
**Lamaĵoj:** kio malfortas kaj nebone funkcias?
**Avantaĝoj:** kiuj pozitivaĵoj ekzistas en la bulgara socio?
**Minacoj:** kiuj negativaĵoj ekzistas en la bulgara socio?

Ni havas precizan listigon de respondoj, kiun la kunsidintoj permesis al mi konigi vaste, sed mi faros tion en posta komuniko. El tiu analizo, sekvis du demandoj: kiel UEA povas helpi al BEA kaj kion BEA povas kontruibui al UEA/ILEI kaj la internacia movado. Ni ricevis konkretajn ideojn por ambaŭ demandoj.

Grava kaj praktika tasko el la kunsido estis la pretigo de aliĝpeto al ILEI por la instruista sekcio fondita antaŭ unu monato ene de BEA, plia estas la deziro de UEA organizi fine de 2015 seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO) ie en la balkana aŭ sudcentra Eŭropa regiono – eventuale en Bulgario – kaj se ne -- almenaŭ kun partopreno de bulgaroj.


La kvar kernaj kampoj de agado en UEA klarigataj.

Aliaj temoj traktitaj: perspektivoj por reaktivigo de la TEJO-sekcio en Bulgario (neniuj tujaj solvoj); ebloj por partopreno de bulgaroj en la UK el Lillo, iamaj ebloj organizi komunan regionan (balkanan aŭ danuban) kongreson kun tri-kvar najbaraj landoj, eble en 2016 aŭ 2017.

Konretaĵo: la rapida aranĝado flanke de UEA de financado de la tuja eldono de prespreta modesta lernilo (bulgara versio de la *Zagreba metodo*). por ke ĝi estu je dispono por la aŭgusta-septembra kurskomenca sezono en lernejoj. Tio subite gravas, ĉar BEA aliris la Ministerion pri Edukado kaj ricevis favoran leteron, permesante la fakultativajn kursojn en lernejoj – por ekspluati tion, urĝe necesas sufiĉe modernan instrumaterialon. Tasko por UEA solvi tion.

Entute intensiva kaj utila posttagmezo! La tuta sperto klare pruvas, ke kvankam retaj kontaktoj utilas, valoras kaj efikas, tamen estas kelkaj kazoj, kie nur fizika surloka vizito atingas la bezonatajn rezultojn.